

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio: Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 4

APRILLO 1946

UNU EL LA PLEJ BELAJ LIBROJ
EN ESPERANTO ESTAS

TIPOJ KAJ ASPEKTOJ DE BRAZILO

Eldonita de
BRAZILA INSTITUTO DE GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO

Grandformata, kun 36 tutpaĝaj ilustraĵoj

Bindita, prezo 13 ŝil. 6 pencoj, afranko 6p.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiuj du vortoj.

Mi deziras korespondi kun gesamideanoj en ĉiuj landoj pri ĉiuj temoj rilate al turismo, ŝipaj aferoj, komerco, kaj propagando por diversaj produktaĵoj. A. Souaki, 3 Kawala Street, Port Said, Egiptujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. kaj poŝtkartojn ilustritajn kun ĉiuj landoj S-ro B. Luiting, Alb. Thijmplein 45, Den Haag, Nederlando. Afranku filatele, certe respondos.

La Kvakerismo (Religia Societo de Amikoj)—Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, London, N.W.1, Anglujo.

Angla biologiisto deziras korespondi pri zoologiaj kaj botanikaj temoj kun alilandanoj. S-ro Anthony Leftwich, 1 The Avenue, Barnet, Herts., Anglujo.

Gildo de Sankta Ajdan: Kultura Kunularo internacia. Celas reprodukti kampanon belecon miniature, kaj serviĝi ĝin al Kristana bonfarado, internaciana amikiĝo, kaj la nepra uzado de Esperanto. Ĉu vi aliĝos? Nenia kotizo.—Gildestro, GSA (Ril. 21), Rectory, Chilton Cantelo, Yeovil, Somerset, Anglujo.

Dankesprimio—Ernest Halliday, 87 New Road, Bedford, Middx., Anglujo, sendas dankojn al siaj gekorespondantoj en aliaj landoj, precipe al tiuj en Francujo, Nederlando, Svedujo, Finnlando, Argentino, Svisujo, Italujo, Afriko, Portugalujo — al ĉiuj "Dankon". Mi deziras gekorespondantojn el la tuta mondo. Bonvole skribu; mi estas korp-kulturisto, biciklisto, sunamanto, naturisto, kaj monda vojaĝanto. Ĉiuj temoj estas bonvenaj; mi certe respondos.

Reprezentadon kaj importadon de teknikaj, speciale elektro-teknikaj, varoj serĉas por Argentino kaj Urugvajo, Ing. Lázaro Musih, Pedro Goyena 38, Buenos Aires, Argentino.

Gasindustrio—mi volas konatiĝi kun gasindustrianoj tutmondaj. Skribu al S-ro J. Brownlee, 4 Embassy Gdns., Newcastle-on-Tyne 5, Anglujo.

Librointerŝanĝado — Portugala Eldona Rondo, Monte Lapa 49-I, Porto, Portugalujo, sendos siajn popolkleregajn ilustritajn eldonaĵojn "La Araneoj", 28-paĝa, "La Vivo de l'Eskimoj", 32-paĝa, kontraŭ novaj, uzitaj nedifektitaj, samvaloraj Esperanto-libroj. Respondkuponoj akceptataj surbaze 1 kajero=2 rpk., 6 kajeroj=10 rpk.

40 gekursanoj deziras korespondantojn el ĉiuj landoj. Nielsen, Havepladsvej 136-I, Fredericia, Danlando.

Teksteknikisto deziras interrilatiĝi kun samprofesianoj el ĉiuj landoj. Skribu al Joaquin Batiste, Alloza 189, Castellon, Hispanujo.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun gesamideanoj de aliaj landoj dudekkvarjara studento de fiziko, Salvatore Russo, Barracca (Messina), Italujo.

S-ro Danove Giuseppe, Canelli (Asti), Italujo, deziras interŝanĝi pm. kun Esperantistoj de ĉiuj landoj.

K. Hečko, oficiro, Krásná Lípa, Masarykova 9, Ĉeĥoslovakujo, volas korespondadi kun ĉiuj landoj. Tuj respondas.

M. Šuryček, oficisto, Nymburk 902, Ĉeĥoslovakujo, volas korespondadi kun ĉiuj landoj. Tuj respondas.

Ni kolektas ilustritajn poŝtkartojn, sed oni sendu ilin sen kovertoj. Ge-sroj Coveney, 6 Woodfield Avenue, Folkestone, Kent, Anglujo.

Letervespero—Bonvolu sendi leterojn kaj bildkartojn por grupa letervespero ĉe Plymouth je 4a Majo. Respondas certe. S-ro Shore, 1 Waterloo Road, Exeter, Devon, Anglujo.

Svedo deziras korespondi kun gesinjoroj en la tuta mondo pri lingvoj, religio, naturo, k.c. S-ro E. Berggren, Hissjön, Svedujo.

Nova grupo deziras Esperantanojn por konstanta ekspozicio. Gesamideanoj helpu! Sendu leterojn, poŝtkartojn, aŭ kion ajn. Ni respondos. Adr.: Poŝtista Studrondo, Turku, Finnlando.

Gelernantoj ĉe telefonfabrikejo deziras korespondantojn. Bonvole sendu leterojn aŭ poŝtkartojn de ĉiu mondparto. Respondo garantiata. Skribu al S-ro H. J. Harris, "La Haveno", Dene Road, London, N.11, Anglujo.

Eldoniĝas senpage al ĉiuj interesatoj angla-Esperanta gazeto "Pacifist-Esperantista Bulteno", Pownal, Maine, Usono.

Mi interŝanĝas poŝtmarkojn, poŝtkartojn, kaj Esperantajn glumarkojn. Bailey, 18a Booths Farm Road, Great Barr, Birmingham 22a, Anglujo.

Poŝtmarkojn (ne sendas unue), poŝtkartojn ilustritajn interŝanĝas Josef Maryška, Vyšhorovice 111, poŝta Mochov u Prahy, Ĉeĥoslovakujo.

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Herongate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 4

APRILLO, 1946

NOVA SANGO

La radoj denove ekturniĝas. Daŭre venas al ni informo jen pri unu, jen pri alia el niaj malnovaj kunlaborintaj organizaĵoj, kaj pri ties iniciato je novaj organizado kaj agado. Kun la fingro sur la pulso de la tutmonda movado ni povas senti la iom-post-ioman reviviĝon de la organizaĵoj, kiujn ni devis dum tiom da jaroj rigardi preskaŭ kiel mortintajn. En la unuaj momentoj post la ĉesigo de la batalado ni atendis kun iomete da antaŭtimo kaj maltrankvilo sed kun multe da scivolo pri la rezulto de la malfermado de la pordoj kaj la malveĝo de la bariloj, kiuj forŝlosis niajn samideanojn for de ni. Kia estos nia movado ? Kiel status niaj amikoj ?

Kiel granda estis nia ĝojo ekscii, ke spite ĉiujn malfacilaĵojn, ĉiujn malpermesojn kaj ĉiajn kontraŭstarojn, nia afero ankoraŭ vivas, eĉ iafoje floras ; ke dum la nigraj tagoj ankoraŭ brilis la espero.

Nun la pensoj de ĉiuj seriozaj aktivuloj sin direktas al la rekonstruo de la disfalintaj organizaĵoj. Multloke oni jam atakis la problemojn kaj inaŭguris praktikajn kaj konkretajn planojn por la restarigo aŭ pliampleksigo de la agado de bone funkcionantaj asocioj kaj societoj. En iuj lokoj tamen oni ŝajnas stari en iom da embaraso antaŭ la problemoj, kiel plej trafe kaj sukcese agi.

La problemoj estas aktualaj por ni ĉiuj, ĉu en landa asocio, ĉu en federacio regiona, ĉu en grupo. La estonteco estas nia—kiu estas la plej taŭga maniero por havigi al ni kiel eble plej baldaŭ la rezulton celatan ?

En niaj vicoj sin trovas diversspecaj, diversaĝaj samideanoj. Estas tiuj, kiuj faris multjaran laboron pro la movado. Plej ofte ili griziĝis en la servo de nia afero. Ili estas la pioniroj, kiuj trabatis sian vojon tra antaŭjuĝo kaj mokrido, tra perfido kaj kontraŭstaro. Ilia sperto estas por ni valora en la nuna tempo. Kaj tamen ofte okazas, ke tiuj niaj amikoj ne sentas sin inklinaj por nova laboro, por novaj rimedoj kaj metodoj, tiel ke la pli junaj, eble ne tre spertaj samideanoj fariĝas malpaciencaj je la "elmodiĝinta" pensmaniero de la antaŭa generacio.

En la nuna tempo enviciĝas al ni granda nombro da junaj, viglaj kaj laborpretaj samideanoj. Dum la jaroj ĵus pasintaj ili kutimiĝis al agado, ofte al rapida agado. Ne kontentigos ilin brakseĝa filozofiado kaj senfina diskutado pri kielo kaj kialo. Ili sentas la urĝan bezonon fari ion kaj tion fari tuj. Tiun potencon volon al objektiva agado ni devos profiti kaj uzi. Kiel do akordigi la du vidpunktojn tiamaniere, ke la tradiciaj gvidantoj de nia afero ne sentu sin uzurpitaj kaj samtempe la nova fervoro kaj entuziasmo ne sufokiĝu de sento de vaneco ?

Jen grava problemoj por niaj gvidantoj. Ĉu ili estos sufiĉe grandanimaj, toleremaj kaj malproksimendaj por akcepti kaj ekspluati la situacion, starante ĉiam konsilopretaj apud la gvidilo ? Se jes, ni povos kun kontento transdoni la gvidilon al la juna generacio, kiu nepre devos fari sian kontribuon al nia granda afero, tiel same kiel siatempe faris la antaŭuloj.

Al la baldaŭa venko la matura sperto kaj la nova sango marŝu manon ĉe mano !

M.S.

PROVOJ DISKONIGI ESPERANTON INTER LA STUDENTARO DE ĈEHOSLOVAKUJO

La ĉeĥaj studentoj multe suferis dum okupado de ilia patrujo. La germana "protektanto" fermis la 17an de novembro 1939 ĉiujn altlernejojn kaj transportigis milojn da studentoj en koncentrejojn; multaj estis ekzekutitaj kaj la resto devis fariĝi laboristoj. Ses jarojn tiu stato daŭris. La tago, 17a de novembro, fariĝis dum la milito simbolo de internacia amikeco studenta kaj de rezisto kontraŭ la perfortuloj. Post liberigo de Ĉeĥoslovakujo venis grava problemo restarigi la detruitajn altlernejojn.

Okazon por la unua kontakto de Esperantistoj kun studentoj donis la Universala Studento-Kongreso en Praha, "La 17a de Novembro", en aŭtuno 1945, kiu, en grandioza kadro ekstera, fariĝis manifestacio de tutmonda solidareco studenta. Partoprenis ĝin reprezentantoj de 53 nacioj el ĉiuj mondpartoj.

La subskribinto kaj s-ano Petr Ŝimon jurstudento, kontaktis la Preparan Komitaton kongresan. La Komitato deklaris sin preta alpreni Esperanton kiel pluan, sesan, lingvon por la kongresaj traktado kaj publikaĵoj, se la kongreson partoprenos certa procento da Esperantistoj. Tiucele la Esperanto-Asocio en ĈSR intertraktis kun IEL, ĉu tiu povus interrilati kun la brita studenta grupo Esperantista; ĝi restis tamen sen rezultato, ĉar la grupo pro militkaŭzoj ne plu funkcias kaj nuntempe estas malfacile vojaĝi eksterlanden.

La Prepara Komitato sendadis al ni regulajn bultenojn, por doni al mi materialon por mia Esperanto-radioparolado pri la kongreso. La parolado okazis la 12an de novembro 1945.

Eniri en la kongresejon rajtis sole delegitoj, aŭtoritatoj kaj homoj posedantaj jurlistan legitimiton. Mi sukcesis, tamen, eniri en du kunsidojn. Tie estis rimarkebla la malnova sperto; la raportoj estis tradukataj en la ceterajn kvar lingvojn, kio konsumis multe da tempo. La kanadaj delegitoj, parolantaj angle kaj france, plendis, ke la tradukanto tradukas neprecize el la angla en la francan.

La studentoj estis tamen atentigitaj pri Esperanto: la Esperanto-Asocio en ĈSR. sendis saluttelegramon kun speciale elektitaj internacie kompreneblaj vortoj. Post peto de la Kongresa Komitato, ni disdonis al la delegitoj kelkcent prospektajn kaj E-broŝurojn pri Ĉeĥoslovakujo, kiuj estis savitaj dum la okupado de nia lando.

Sur ĉiuj aŭstabiluloj kaj stratanguloj frapis la okulojn belaj aŭŝoj pri Esperanto. Mi povis paroli persone kun kelkaj delegitoj; la albana promesis lerni Esperanton laŭ la donacita al li albana ŝlosilo. Mi serĉis inter ili Esperantiston por fari intervuon kun li en la Esperanto-disaŭdigo. Mi trovis junan bulgaran inĝenieron, sed bedaŭrinde liaj lingvo-scioj ne sufiĉis por tiu celo.

Ni tradukis por la Komitato leteron, per kiu ĝi sin turnis al la internacia Esperantistaro, "portantoj de kulturo internacia", kun peto aĉetadi la valoran kongresan memormedalono, sur kies unua flanko troviĝas sigelo de la Karlo-Universitato de Praha—la plej malnova universitato de la Eŭropa kontinento norde de la Alpoj—kaj sur la alia, emblemo de la kongreso. Ĝia prezo estas Kčs 50, 100 sv. fk., 1 dol. aŭ 5 ang. ŝil.; la profito estas destinita por la konstruo de nova Akademia domo en Praha.

La E-Asocio trandonis al la Prepara komitato resuman leteron pri la Esperantista kontribuo por la Kongreso, precipe pri la mallongaj E-dissendoj dum dek tagoj kaj pri la supre menciita parolado pri la Kongreso, kiuj informis la eksterlandon pri la afero. La Komitato esprimis esperon, ke ni povos kunlabori pli intense dum la venonta studenta kongreso en Praha.

S-ano Ŝimon verkis paroladon pri rilato de la Ĉeĥa reĝolando kun la Germana regno en pasinteco, laŭ nova libro de sia instruisto d-ro Václav Vaněček, universitata profesoro de la historio de la ĉeĥoslovaka juro. Mi prezentis ĝin la 21an de jan. en la E-disaŭdigo. La parolado havis internacian eĥon kaj sekve mi skribis leteron pri ĝia sukceso inter Esperantistoj kaj prezentis ĝin persone al la profesoro: krome mi informis lin pri niaj lastaj sukcesoj helpe de Esperanto. La profesoro estis tre ĝojigita kaj decidis mem forsendi la leteron al la koncerna ministerio. Li konfesis al mi, ke li iam lernis Esperanton.

Antaŭ kelke da tagoj mi ekrlitis kun la estro de la poreksterlanda sekcio ĉe Societo de Ĉeĥoslovakaj Jurstudentoj en jurista fakultato de la Karlo-Universitato en Praha kaj informis lin pri Esperanto; efikan impreson faris la E-korespondadoj de la Ĉeĥoslovaka radio, kiujn mi prezentis al li. La Societo reĉas fakan kunlaboron kun alilandaj jurstudentoj kaj juristoj en lingvoj angla, rusa, franca kaj hispana, eldonos kvinlingvan broŝuron, sendotan al la nomitaj personoj kaj komencos kun ili fakan kunlaboradon. La estro tuj deklaris

sin preta fondi Esperanto-fakon de la Sekcio kaj varbi por ĝi per surmura aŭso en la fakultato. Li petas, ke Esperantistoj helpu al la Societo krei la internaciajn rilatojn. Unue estas bezonataj adresoj de jurstudentoj kaj juristoj. Se anoncos sin sufiĉe da interesigantoj, la publikajoj estos eldonotaj ankaŭ en Esperanto.

Ni urĝe petas jurstudentojn, juristojn kaj personojn de ĉiuj landoj, kiuj interesigas pri jurscienco, anongi sin tuj al la adreso: Radio Praha, Praha XII, Esperanto-disaŭdigo, Ĉeĥoslovakujo. Samideanoj, bonvolu atentigi eĉ ne-Esperantistojn. Koncernan alvokon jam alportis la ĉsl. Esperanto-disaŭdigo.

Se la entrepreno sukcesos, Esperanto radikigos en la universitata medio kaj portos gravan utilon al nia komuna ideo.

La Prepara Komitato de la Internacia Studento-Federacio ĵus decidis, sub impreso de la unua kongreso, okazigi la venontan Universalan Studento-Kongreson refoje en Praha, en aŭgusto 1946. Ĝi estos nova grava okazo por ni. Dependas nur de Esperantistoj, ĉu Esperanto akiros tie bonan fundon.

Antaŭen, samideanoj! Anoncu vin!

J. Mařík, Ĉeĥoslovakujo

HELPOPETO

Estimataj Geamikoj:

La konata diro, *Unueco estas Forto* valoras ĝenerale en la homa agado. Sole ni estas malfortaj, kune niaj penoj fariĝas fruktodonaj. Al ĉi tiu bonvola kunagado alvokas vin finna Esperanto-gazeto *Esperanto-Airit* kaj ties aldono *Semajna Letero*. La milito malfortigis ĉian ekonomian agadon en Finnlando kaj tial ankaŭ la Esperantan. Sekve nia gazeto treege suferas en senespera ekonomia senhavo.

Ni scias, ke vi ne povas doni monan helpon, sed jen maniero por kiu vi povas lin helpi. Ĉiuspecaj vestaĵoj ktp. estas treege bezonataj en nia lando kaj se vi povus sendi al ni tiaĵojn, uzitajn aŭ novajn, ni povus ilin vendi por la bono de nia gazeto. (Tamen antaŭ ol sendi, bonvolu vin informi, kion oni povas sendi el via lando, ĉar ekzemple el Britujo oni povas sendi eksterlanden preskaŭ nur librojn).

Ne necesas ke vi nepre sendu grandan kaj valoran pakaĵon; eĉ la plej malgranda estos bonvena kaj ni estos treege dankaj. Kiel etan rekompencon, ni sendos al ĉiu sendinto la gazeton kaj ties aldondon dum la nuna kaj sekvonta jaroj.

Bonvolu ĉion adresi al: Esperanto-Airit, Seinäjoki, Suomi-Finlando.

Antaŭdanke kaj samideane via,

Otto Pallikainen, redaktoro

EL AŬSTRUJO

En 1938 kiam la germanaj naciistoj ekokupis Aŭstrujon, ili malpermesis Esperanton. Multaj aŭstraj samideanoj estis malliberigataj kaj aliaj mortis sekve de la sklavigo de la aŭstra popolo. Tamen, kie tio estis ebla, la Esperantistoj laboris en sekreto, klopodis konservi la rilatojn kun eksterlando kaj helpis alilandajn laboristojn loĝantajn en Aŭstrujo dum la milito.

Tuj post la liberiĝo en printempo 1945, oni faris klopodojn restarigi la Esperantomovadon kaj en Septembro de la sama jaro la du Esperanto-asocioj de Aŭstrujo—La Aŭstria Esperantista Asocio (AEA) prezidanto S-ro Hugo Steiner, kaj Aŭstria Esperantista Federacio (AEF) prezidanto S-ro Paul Glüxmann—unuigis. De tiam ekzistas en la lando nur unu asocio, Aŭstria Esperantista Federacio. Laŭ la deziro de la anoj, la nova asocio estas tute neŭtrala rilate la politikon. La estraro de AEF konsistas el:—Prezidanto, Paul Glüxmann; unua VicPrez. D-ro Leopold Grimme; dua VicPrez. D-ro Maximilian Führung; tria VicPrez. S-ro Alfred Berdan; Sekretariino, Maria Loibel; Protokolistoj, Maria Zajicek kaj S-ro Menacher; Instruado, S-roj Stengl, Aitzinger kaj Sager; Propagando, S-roj Magenbauer kaj Vokal; Bultenredakcio, S-roj Cech, Berdan kaj D-ro Grimme; Kontrolistoj, Fr. Th. Bischof kaj G. Kantzianka.

Ĝis januaro funkciis en Vieno 21 Esperanto-grupoj kaj estas grupoj en la provincoj. La gazetoj tre favoras Esperanton kaj dediĉas spacon al nia afero, kaj la revuo *Demokratische Pädagogik* (Demokrata Pedagogio), enhavas Esperanto-angulon redaktatan de D-ro E. J. Görlich (Wien).

La 4an de Okt. la Esperantistoj en Wien aranĝis solenan kunvenon en kiu parolis Ŝtata Sekretario D-ro Karl Lugmayer kaj Urba Konsilanto D-ro Viktor Matejka. Dua kunveno okazis por festi la datrevenon de la naskiĝtago de D-ro Zamenhof.

Oni starigis en Aŭstrujo specialan societeton, kies celo estas havigi amikojn de Esperanto; tio estas, personojn, kiuj mem ne uzas kaj ne deziras uzi la lingvon, sed kiuj rekonas ĝian valoron kaj deziras subteni la movadon.

Dr. E. J. Görlich, Aŭstrujo

EL BRAZILIO

Unu el la plej konsiderindaj sukcesoj de Esperanto en Rio de Janeiro estas la starigo de Esperanto-klubo en la Kristana Asocio de Junuloj (YMCA). En januaro, sekve de peto farita de la Sekretariino de Brita

Asocio de Esp. Instruistoj pri korespondado, oni tie starigis kurson sub gvido de S-ro R. das Neves, iama Prezidanto de Portugala Instituto de Esp. en Lisboa. Tiu kurso havis grandegan sukceson. Sin enskribis preskaŭ 200 personoj. La plimulto el ili estis gestudentoj de diversaj fakultatoj de la Universitato. Kiam finiĝs la kurso, oni starigis la klubon, kiu poste aranĝis sinsekvajn kursojn, kiuj jam enkondukigis en la normalajn programojn de K.A.J.

La nun funkciantaj kursoj estis inaŭguritaj per solena festo kaj ekspozicio de Esperantistoj, en kiu parolis fama filologo brazila, Prof. José Otíctica, de la Kolegio Petro 2a, en Rio. Ankaŭ parolis ekspozitoro de Universitato Hamburg, Prof. Otíctica, malnova Esperantisto kaj aŭtoro, kiu faris prelegon pri kaj por Esperanto.

Kiel insignon la Esp.-klubo elektis la konatan ruĝan triangulon de la YMCA kun, interne, la kvinpinta verda stelo, ambaŭ internaciajn. La estraro de K.A.J. petis oficialan registron de tiu insigno por ke ĝi estu utiligata tra la mondo nur de la anoj de Esperanto-kluboj de la YMCA. Ni kredas, ke tiu de Rio estas la unua. Estas la deziro de la estraro, ke oni starigu similajn Esp.-klubojn en ĉiuj filioj de Kristana Asocio de Junuloj tra la mondo, poste ilin grupigu per internacia organizado kaj eldonu fakan organon.

Kun la fondo de la E.-K. de K.A.J. en Rio, nia movado en Brazilo ricevis novan sangon, novan entuziasmon. Tio estas grava por la Esperanto-movado ĝenerale, ĉar nur necesas menciigi, ke la YMCA havas tra la mondo 10,800 filiojn. Oni volonte donos informon ĉe: Esperanto-Klubo de Kristana Asocio de Junuloj, Poŝtkesto 254, Rio de Janeiro, Brazilo.

O. Crespo Nunes

EL GERMANUJO

Dum la tiraneco de la naciistoj en Germanujo, Esperanto ne havis lokon. Jam en la unua jaro, la internaciaj organizaĵoj estis malpermesataj. Multaj anoj estis malliberigataj pro suspekto de perfido kontraŭ la patrujo, kaj aliaj suferis ĉiaman observadon je la germana sekreta polico. La bibliotekoj de la asocioj kaj privataj libroj estis konfiskataj kaj oftfoje publike bruligataj. La ŝtato jam ne toleris en Germanujo la "internacian hebrean sensecaĵon". Jam en 1933 Germanujo fordonis sian eblecon akceli per Esperanto la interkompreniĝon inter la diversaj popoloj.

En la komenco de la faŝista reĝimo, Esperanto ne estis oficiale malpermesita. Ekzistis faŝistaj Esperantistoj, kiuj fondis *Germanan Esperanto-Asocion* (DEB) kaj *Nov-Germanan Esperanto-Movadon* (NDEB), kies gvidantoj estis partianoj kaj kies taskoj ŝajne estis, unue, batali unu kontraŭ la alia, kaj due, propagandi ĉe la registroj la taŭgecon de Esperanto kiel perilo por konvinki eksterlandanojn pri "la praveco de la alta ideo de la faŝismo." Sed estis vana provo je netaŭga celo. La "Führer" jam rifuzis Esperanton en sia *Mein Kampf* (Mia Batalado) kiel, "nedezirindan internaciigilon", kaj en somero de 1935 la propagandministro Goebbels, fine absolute malpermesis kiun ajn uzadon aŭ instruadon aŭ eĉ mension de Esperanto. Publike e jam ne aŭdis eĉ la vorton *Esperanto*. I junularo kreskis sen la plej malgranda ideo pri la ekzistado de internacia helplingvo. Sed malnovaj Esperantistoj kelkfoje uzis la lingvon kaj eĉ dum la milito riskis kaŝe helpi, pere de Esperanto, diversnaciajn samideanojn perforte transportitajn kiel sklavoj al Germanujo.

Tamen, kvankam la movado estis haltigita, la flamo ankoraŭ bruletis, kaj longatempe antaŭ ol la unuaj germanlingvaj gazetoj aperis, iu esperplena samideano surgluis sur murojn de ruinoj en München, afiŝojn kun la teksto: *Kiu parolas Esperanton?* Tio estis sukcesa. Kelkaj samideanoj, kiuj antaŭe eĉ ne vidis unu la alian, sin anoncis kaj decidis kolekti ĉiujn malnovajn Esperantistojn por fondi novan grupon kaj por revivigi la movadon en Germanujo. Loĝante en la regiono okupata de la Usona militista aŭtoritato, ili kun sukceso petis permeson starigi Esperantistan grupon. Intertempe aperis germanlingvaj gazetoj, kaj per ilia helpo kaj per la helpo de Radio München, ili invitis samideanojn sin anonci ĉe la prezidanto. La unuan publikan kunvencon de la grupo en München, 20-1-194, ĉeestis 250 samideanoj el diversaj lokoj de Sudgermanujo. Eĉ eksterlandanoj partoprenis. En tiu kunveno oni decidis esti tute neŭtrala rilate al iuj politikaj aŭ religiaj tendencoj, kaj dediĉi la tutajn energiojn al komunaj celoj, nome, instruado de Esperanto, uzado kaj disvastigo de la lingvo kaj disvastigado de pacaj idealoj pere de Esperanto. Kaj ĉar la grupanoj scias, ke pro la mizeraj kondiĉoj, kiujn postlasis kiel fiberedaĵon la venkitaj faŝistoj, la celoj de la grupo ne estos facile atingeblaj, ili donis al sia grupo—la plej unua en la regiono de Germanujo okupata de la Usonanoj—la nomon "Laboro."

D-ro Siegfried Ziegler, München

ESPERANTO KAJ RADIO

Dimanĉo	18.10	Bern (Svisujo). 47.28m. Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco. Paroladetoj de D-ro Privat.
	21.30-21.45	Praha (Ĉeĥoslovakujo). 49.92m. kaj ofte 1571m. Politikaj, kulturaj kaj ekonomiaj informoj. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
Lundo	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. Preleĝoj, intervjuoj, teatraj scenetoj, kantoj kaj informoj pri la Esperanto-movado. Radiostacio, Stalinova 12, Praha XII.
	22.00-22.15	Varsovio (Polujo). 49.06m. Informoj. Pola Radio, Koszykowa 8, Varsovio.
Mardo	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Moravska Ostrava (Ĉeĥoslovakujo). 325.4m. Informoj. Radio Moravska Ostrava.
Merkredo	16.00	Sofio (Bulgarujo). 352m. Parolado.
	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
Ĵaŭdo	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	21.50-22.00	Praha. 470.2m. (kiel je lundo).
Vendredo	14.45 (?)	WRJN Racine (Wisconsin, Usono). Parolado, muziko, kurso. S-ro S. Klukowski, 3233 S Springfield Avenue, Milwaukee 7, Wisconsin. Pluaj detaloj mankas.
	20.30-20.45	B.N.R.O. Kortrijk (Belgujo). 202.3m. Parolado. Zender Kortrijk van de B.N.R.O., Rijselstr. 36, Kortrijk.
Sabato	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).
	18.30-18.45(?)	3 SR (Aŭstralio). 238m. Novaĵoj. Nur je la dua sabato de ĉiu monato.
	19.00-19.45(?)	PRA 2 (Brazilo). Paroladoj pri Esperanto. Ministerio por Edukado kaj Saneco, Praca da Republica, Rio de Janeiro.
	20.00-20.30	PRI 3 (Brazilo). 49.75m. Paroladoj pri Brazila vivo. "Brazila Kroniko". Radio Inconfidência, Belo Horizonte, Minas Gerais.
	21.30-21.45	Praha. 49.92m. kaj ofte 1571m. (kiel je dimanĉo).

Klarigoj—En la tabelo la horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich, sed demanda signo post la horo signifas, ke ni ne havas precizan informon pri la horsistemo laŭ kiu oni kalkulas: por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon. La donitaj adresoj estas tiuj al kiuj oni sendu gratuleterojn kaj informojn pri ricevado.

Radio Praha—La apuda bildo montras la filmaktorinon, F-inon Yvonne de Petry (bofratinon de la konata Esperanto-verkisto Jean Forge), kiun intervjuas S-ro Antonín Slanina ĉe la mikrofono de Radio Praha la 5an de novembro, 1945. Praha nun meritplene nomas sin "Verda Stacio". Oni promesas eĉ pliriĝigon de la programoj, kaj informas nin ke geaktoroj de diversaj teatroj en Praha studas Esperanton por plezurigi nin en venontaj disaŭdigoj.

Nederlanda Radio—Lastmomente ricevis informon ke Hilversum II (V.A.R.A.) okazigos dek kvin minutan paroladon en Esperanto la 27an de aprilo je la 14a horo (Nederlanda tempo?) sub la organizado de la Federacio de Laboristaj Esperantistoj. Pluaj elsendoj sekvos. Skribu al V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.

Vidu ankaŭ paĝon 61.



RECENZOJ

* = akireblaj ĉe I.E.L.

***Londonanidoj** — Originala verko de Donald W. Munns. The Esperanto Publishing Company Ltd., 1946. 90 pp. 2 ŝil. 6p.

Jen libro antaŭ ĉio por nia frujunularo. Tiaĵ ja ne abundas en nia literaturo. Ĝi pritraktas lerneĵojn, kiujn oni elurbigis el Londono al kamparo je la ekmiito 1939. Ĝi rakontas, kiel la elurbigoj konfliktas kun la enloĝantoj, kiel ili tie ekvivas en por ili tute novaj cirkonstancoj, kiel oni aranĝas al ili provizoran instruadon, kaj antaŭ ĉio, kiel ili ludas kaj sportas kaj amike bataladas inter si.

La verkinto mem apartenas al la sama junularo. Li estis nur 14-jara, kiam li verkis la libron. Ja ne estas ĉiutaga fenomeno, ke tiaĝa knabo verkas tian romaneton kaj estas preskaŭ miraklo, ke li povas verki ĝin originale en Esperanto, studinte la lingvon dum 15 monatoj antaŭe. Aliflanke tio ja montras la facilecon kaj esprimkapablecon de nia lingvo.

Kaj tamen la verko montras multajn bonajn trajtojn kaj laŭlingve kaj laŭenhave. La verkinto ŝajnas tre bone estri Esperanton. Tion pruvas bona stilo kaj multaj vortformadoj tre originalaj, sed tre sukcesintaj. La juna verkinto estas ankaŭ lerta psikologo, kies multaj rimarkoj pri mensaj terurilatoj de infanoj kaj plenkreskuloj estas trafaj. Precipe min ravas la kapablo de la juna verkinto sin meti en la pozicion de ĉiuj priskribitoj, eĉ de la knabinoj. Kiel lerte li ankaŭ preparolas la demokratemecon de la geknaboj!

Kompreneble plenkreska leganto trovas multon por kritiki. El la ludoj priskribitaj, futbalo, ŝnursalto, amikaj bataladoj estas ja konataj al alilanduloj, sed la konkerludo ne estas tia kaj ties reguloj restas neklaraj kvankam oni konsultas la Terminaron de Infanludoj de I.E.L. Kelkfoje la priskriboj de ludoj estas enue trodetalaj. Tre konfuze estas, ke en la teksto troabundas personoj; da ili estas pli ol 50! Familiaj nomoj estas anglalingvaj, antaŭnomoj same, sed kun Esperanta o-finaĵo. Se la nomoj ne estas kaŝnomoj, ili almenaŭ povus en originala Esperanto-romano esti tiaj, kaj tiel estus preferinde elekti pli internaciajn nomformojn.

La lingvo estas plejparte kontentiga, eĉ bona; maloftaj eraroj apenaŭ malplivalorigas la verkon. Kelkajn neklarajn esprimojn mi ankaŭ trovis. Jen kelkaj eraroj. Neesperantaj vortoj: *riposti* (4-foje) = *rebat*, *respondi*; *plonĝi* = *subakviĝi*. *Morgaŭ* kiel subst. devus esti *la morgaŭo*; misuzo de *ĉe* en *ĉe la domo*; la *unua*

knabino atingi la finiĝon estis . . . devus esti atinginta; *tiam* dufoje antaŭtaŭ poste; *pri ĉu anst. ĉu*, kaj kelkaj aliaj.

Preserarojn mi trovis kelkajn. Sed pri tiuj ne estas respondeca la verkinto, ĉar laŭ la antaŭparolo de la eldonejo, "kun granda bedaŭro ni devas informi la legantaron, ke Donald Munns mortis en marto 1945, nur 15-jara." Vere granda perdo, ĉar oni estus povinta atendi de li multon.

Kvankam la recenzita verko estas ĉefe por 10-15-jaruloj, kaj por ili verŝajne tre interesa, ankaŭ plenkreskulo legas ĝin kun intereso, kaj ĝi meritas, malgraŭ siaj mankoj, legantojn ĉiuĝaj en la tuta mondo.

Joel Vilkki, Finnlando

***La Vivo de l' Eskimoj**: de Prof. A. da Silva; elportugaligis M.F., eldonis Port gala Eldona Rondo, Monte da Lapa 49-1, Portugalujo, prezo 7p.

Ĉi tiu dua revizita eldonaĵo en la serio *Ĉirkaŭ la mondo* prezentas tre interesan informon pri la vivo de la indiĝenoj de la nordaj landoj. En ĝiaj 32 paĝoj, kun ilustraĵoj, sin trovas granda nombro da faktoj pri iliaj kutimoj, moroj kaj superstiĉoj, objektive prezentita per tre klara kaj simpla stilo. Laŭ lingva vidpunkto, la nova eldono estas modelo.

M.S.

***Avo Joco Rigardas**: Ivan Vazov, el Bulgara lingvo trad. K. Georgiev. Eld. Bulgara Esp. Asocio; prezo 6 pencoj, afranko 1 penco.

23-paĝa represaĵo de simpla kaj kortuŝa rakonto el la vivo de Bulgara kamparano. La temo—maljuna blindulo kaj ties reagoj dum li *rigardas* la por li mirindajn kaj preskaŭ nekredablajn ŝanĝojn, kiuj okazas en la tiutempe nova, liberigita Bulgarujo (1876)—posedas universalan intereson kaj allogon. Tre releginda.

M.S.

***Rido Sanigas** (Elektitaj Humoroj) kolektis kaj eldonis I. Georgiev kaj T. Iŝev, prezo 8 pencoj, afranko 1 p.

111-paĝa broŝurita kolekto de ŝercoj kaj bonhumoraj anekdotoj, veŝpoŝe granda. La ideo tiel kunigi en unu volumeton legindajn spritaĵojn en Esperanto estas bona. Tamen, ne dezirante malkuraĝigi la eldonistojn, mi volus atentigi, ke la Esperantistoj ĝenerale preferas bele presitajn kaj firme binditajn librojn. Mia ekzemplero ĉifoniĝis post unua tralego. Cetero la multaj eroj plejparte estas tre spritaj kaj amuzaj.

M.S.

***La Granda Aventuro** kaj aliaj rakontoj : de Ferenc Szilagyí. Eld. Soc. Esperanto, Stockholm. Prezo, kartonita 10s. 6p., afranko 6p.

La nomo de F. Szilagyí sur libro jam estas indiko pri la literatura kvalito de la enhavo, kaj pri ĉi tiu nova kolekto de originalaj noveloj, nin ne perfidas nia optimismo. F. Szilagyí posedas en granda mezuro tiun genian talenton briligí ĉion, kion li tuŝas. Iufoje lia stilo memorigas pri soleca vaganta sunradio, kiu subite kaj nur dum momento transformas antaŭ niaj okuloj en kolorriĉan spirhaltigan bildon la grizan prozaĵon de la ĉiutago. En ĉi tiu volumo malkovriĝas al ni freŝaj ĉarmoj kaj novaj beloj.

En *La Granda Aventuro*, la unua el la pecoj, ni kontaktas la negativan revemon de maldiligenta junulo, vivanta en la efemera mondo de voluptaj sopiroj, kaj la delikata ironio de la aŭtoro tie trovas belan kampon sur kiu sin manifesti.

Kelkaj el la noveloj prezentas tiujn fazojn de la vivo Esperantista kaj tio donas fazaĵajn okazojn por ekspluato de la konata spirito de Szilagyí. Aparte ĝuindaj el tiu speco, estas *Pri Mia Knabina Animo* kaj *La Dolĉa Portreto* kaj mi estas certa, ke la samideanoj — precipe tiuj, kiuj gvidis kursojn kaj helpis al siaj kursan(in)oj pri ties korespondado—ĝuos en ili la pikan bonhumoron de la verkisto.

La verkaĵoj estas tre variaj kaj oni povos ion trovi por akordi kun kiu ajn humoro. Pro tio estas konsilinde ne provi asimili ĉion per unu gluto, sed iri kaj reiri al ili kaj tiel ricevi la plenan guston.

La Liberiĝo de la Juĝisto tre intime tuŝas fazon de nia subkonscia memo, ĉar sendube ĉiu el ni iam sentis la deziron forfuĝi de ĉio nin katenanta—la deĵoro, la ĉiutaga rutino, la banalaĵoj de la ordinara seneventa vivo, eĉ la hejmo, kaj la sociaj konvencioj kiuj nin limigas kaj embarasas—por ĝui novan, eble ne antaŭe spertitan liberecon, eĉ se tio daŭros nur mallonge.

Sennome portas nin abrupte en la medion de la milito, de la koncentrejo kaj la homa mizero, kaj *Vintre* preskaŭ dolorigas per la viveco de la priskribo pri la tragedio de maljunulino, soleca, forlasita, sin trenanta al sia domaĉo, kiel besto al sia nestego, en la frosta malvarmego. En tiuj du rakontoj ni ja sondas la profundon de la homa mizero.

Libera Rabo posedas kuriozan ĉarmon, malgraŭ tio, ke ankaŭ ĝi pritraktas epizodon en milito—ne moderna, sed de la dekoka jarcento—ĉar la emfazo ĉi tie estas sur la intelekta flanko pli ol la fizika.

Oni ne povas ne admiri la mirindan lingvoposedon de F. Szilagyí kaj oni devas allasi, ke li plenrajte okupas sian lokon

inter la unuarangaj verkistoj de Esperanto. Iufoje lia prozo posedas preskaŭ lirikan kvaliton.

Neologismoj — tiuj malbenaĵoj de la Esperanta legantaro—feliĉe mankas, kun escepto de *preventive* (p. 62) kiu estas uzata kun la duobla signifo *protekti* (nin) *per malhelpo* (ke io okazu). Pri la kelkfoja uzado de *reakci* mi diros nur, ke mi preferas *reag* por tiamaniere konservi la originalajn signifojn (en rilatoj politika kaj kemia). Ŝajnas al mi, ke la nenecesa uzado de radiko en okazo, kiam tradicia formo sufiĉas, deprenas de la esenca valoro de tiu radiko. Supozeble *sardenoj* (p. 41) anst. *sardeloj* estas pres- aŭ plumeraro.

La preso kaj papero estas bonaj, kaj la tre alloga kovrilo multe aldonas al la havindeco de la verko. Tre rekomendinda libro.

Mason Stuttard, Anglujo

Kie Loĝas Esperantistoj en Nederlando : landkarto, 36×43 centimetroj, de Nederlando kun verdaj steletoj por indiki lokojn, kie troviĝas Esperantistoj. Desegnigis kaj eldonis H. C. Magel, Voorbeek 6, Aalst-Waalre, Nederlando, prezo 75 ned. cendoj aŭ 6 resp. kuponoj. Tre interesa propagandilo estas ĉi tiu karto kaj se efektiviĝos la anoncita intenco de la desegnisto, eldoni kartojn ankaŭ de aliaj landoj, kontraŭ bezono, la serio estos valora kaj tuj videbla pruvo de nia forteco; Multaj estas la manieroj per kiuj oni povus ĝin uzi. La aspekto de la karto estas tre plaĉa kaj la eldonisto meritas gratulon pro genia penso.

Mason Stuttard

Kuracistoĝo notu : Komencante per la decembra (1945) numero, la faka revuo, *Journal de Médecine de Lyon* (52 Rue Victor-Hugo, Lyon, Francujo) denove aldonas Esperantlingvan resumon de la franclingve verkitaĵ artikoloj. La resumoj estas farataj de D-ro Wittlin—adreso supre—al kiu korespondadoj estu direktataj.

NASKIĜO

Holm—Je 23 Aŭg. 1945 al Ge-sroj Jenny kaj Peter H. Holm, FD de IEL, Finlandsgade 42, Esbjerg, Danujo, filo nomita Fleming.

MORTO

Eduardo Antonio dos Santos naskiĝis je la 7a Sept. 1876 kaj mortis la 30an de Jan. 1946. Li ĉeestis la unuan kurson de Esperanto en Lisboa, ricevis la unuan premion en tiu kurso, kaj de tiam ĉiam restis fervora samideano.

AMO AL LA NACIOJ

En la proksima estonteco la interrilatoj inter la diversaj lingvogrupoj necese fariĝos pli intimaj ol dum antaŭaj epokoj. Estos la tempo de rapidegaj flugmaŝinoj, kiam la distanco inter Jerusalemo kaj Londono estos pli mallonga ol inter Jerusalemo kaj iu nordpalestina vilaĝeto! Dum kelkhora aerovojaĝo oni transpasos la teritoriojn de proksimume dek diversaj lingvo-grupoj. La scienca kaj komerca kontaktoj inter tiuj lingvo-grupoj nepre alvenigos kun si ioman studon de iliaj lingvoj, el kiuj multaj vortoj kaj esprimoj fariĝos pli aŭ malpli internacie konataj. Multaj intelektuloj eble estos devigataj eĉ pli detale studi diversajn lingvojn por povi legi iliajn publikajojn. Tamen tia kono de lingvoj ne malnecesigas unu komune aprobitan lingvon internacian, sed faciligos ĝian lernadon. Se iu fanfaronas, ke li povas *libere* paroli 4-5 lingvojn, ne kredu al li, kvankam li mem eble ne scias, ke li mensogas. Estas granda diferenco inter komprenado de lingvo kaj la eblo ĝin paroli regule, senerare, elegante, kiel decas al homoj kiuj respektas sin kaj la lingvon en kiu ili parolas. La eblon sin esprimi tiamaniere en lingvo alia ol la gepatra povas doni sole artefarita lingvo, simple logika en ĝia konstruo, facile ellernebla de la infanjaroj kaj sentita de ĉiu homo, kiel lia individua propraĵo tiel same kiel lia gepatra lingvo. Tiu lasta donas al la Lingvo Internacia alian, pli gravan etikan valoron; ĝi edukas en la homo, kiu ĝin parolas, la senton de tuthomara solidareco, tuthomara unueco, la spiriton de internacia amo.

Tiun ĉi lastan esprimon ni devas klarigi. Kion propre signifas la termino *internacia amo*? Ĝi certe ne povas signifi la amon de ĉirkaŭbrakumoj kaj kisado. Oni ja ne povas vagi tra la mondo kaj amkaresi la naciojn! Sed *amo al nacioj* signifas la sinceran deziron ekkoni ilian veran karakteron, kaj reciproke konigi al ili la veran karakteron de nia propra nacio. Ekkoni kaj respektplene priprezi kaj ŝati ilin eĉ malgraŭ la grandaj ecdiferencoj inter ili. Sed la amo al nacioj signifas ankoraŭ pli ol tio; ĝi signifas zorgi pri la bonstato de aliaj nacioj, tiel same kiel ni zorgas pri la nia. Zorgi serioze, plenkore, ne nur teorie aŭ dogme, sed traduki tiun zorgemon en praktikan agadon por la bono kaj feliĉo de aliaj nacioj!

Mi ne akceptas valordiferencojn inter la popoloj. Ne ekzistas por mi popolo pli valora kaj popolo malpli valora. Ekzistas sendube diferencoj inter la evolugrado jam atingita de diversaj nacioj de la mondo.

Sed la kulturgrada diferenco ne signifas valordiferencan, ĉar en ĉiu popolo, eĉ en la ankoraŭ staranta sur plej malalta kulturŝtupo, estas latente vivantaj fortoj de alta kaj sankta valoro. Estas la devo de altkulturaj popoloj helpi al iliaj malaltkulturaj fratpopoloj elevoluigi tiujn latentajn fortojn en kiom eble rapida procedo. Jen estas la signifo de la termino *internacia amo*. Ĉiu popolo havas la rajton aspiri al sia feliĉo, kaj ĉiu havas la devon ĝoji pri la feliĉo de aliaj, kiel pri sia propra. Mi estas profunde konvinkta, ke la feliĉaspiroj de ĉiuj popoloj povas esti atingataj senkonflikte kaj senbatalo. Estas kalumnio, ofendo al la homa genio, diri ke la feliĉo de unu popolo estas realigebla nur je la kosto de la feliĉo de aliaj. Sur tiu granda, vasta, verda, larĝa tero, frukta kaj fruktigebla, ĉu ni ne povos pli kontente vivi ol la nun vivanta homaro? Certe jes. Sed kun unu kondiĉo. Tiu kondiĉo estas, la realigo de la vortoj de la profeto: "Mi forprenos de vi la koron el ŝtono kaj donos al vi koron el karno". Notu, ne pri koro el oro parolas la profeto, nek pri koro el sunaj radioj, sed pri simpla, modesta, sentanta koro el natura homa karno!

Ekzistis iam en la unua tempo de la Budhismo tre bela kutimo. Kiam homo malsaniĝis, la ĉefpastro iris preĝi la helpon de Dio, kaj marŝante sur la stratoj profunde kliniĝis antaŭ ĉiu homo, kiun li renkontis, ĉu riĉa, ĉu malriĉa, altranga aŭ simple komuna, ĉar en ĉiu homo loĝas la dieca spirito, en ĉiu kvazaŭ parto de Dio mem.

Jen la signifo de la vortoj *amo kaj respekto al la nacioj*. Ĉar tiel same, kiel ĉiu homo, ankaŭ ĉiu nacio portas en si la fajrerojn de la sankta spirito. Tiun respekton al la nacioj, tiun amon al ili simbolas por ni la Verda Standardo. Se la homoj komprenus tion, ne nur cerbe, sed profunde en la koro, tiam la jusa tragedio de la homaro ne estus okazinta.

Kune kun ĉiuj popoloj de la mondo, ni kredas trovi amikan komprenon por niaj feliĉaspiroj en la estonta *ligo de popoloj* unuigita sub nia kara verda standardo. La Esperantistoj *ĵuris labori, ĵuris batali por reunuigi homaron*. Kaj ni bone scias, ke la Esperantismo ne apostatas. Tra la nokto de la nuna epoko mi vidas la briletantajn radiojn de la estonta internacilingve kunligita homaro. Ĉiuj nacioj, egalvaloraj, kantos sian propran vivmelodion, kaj la kantoj de ĉiuj unuigos en unu grandan orkestran glorsimfonion,

Elĉepaĵo el malferma parolado en la 7a Palestina Esperanto-Jarkunveno en Jerusalemo, farita de D-ro E. Olsvanger

INTERNACIA KUNLABORO INTER GEINSTRUISTOJ

Pensoj pri la pasinta kaj estonta situacioj

Dum iu dummilita kunveno de edukistoj en Britujo, kiun ĉeestis reprezentantoj el aliaj landoj, oni diris, ke nenia internacia unueco estas ebla sen unuiĝo de la instruista profesio.

Ni, Esperantistaj geinstruistoj, jam faris gravan paŝon lerninte komunan lingvon, sed ĝis nun ni estas tro malmultaj kaj ne sufiĉe konsciaj pri nia granda potenco. Aliaj personoj klopodis pri *Esperanto en la Lernejo*, faris reklamojn, elspezis entuziasmon kaj monon, sed simple per la praktika kaj konstanta kunlaborado de sufiĉe da ordinaraĝ geinstruistoj en diversaj landoj oni ja povus havigi multflankan unuiĝon kaj vastan interkompreniĝon.

Dum mia longa laborado en porinstruistaj seminarioj, teknika kolegio, kaj postlernejaj kolegioj por junaj dungitoj, mi vidis multajn flankojn de la instruista mondo. Krome, kiel agento de T.A.G.E. (1932-1939), sekretario de la Eduka Komitato de B.E.A. (1932-1944), kaj sekretario de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj de 1939, mi havas sperton pri la Esperantista movado en tiu rilato. Mi esperas, do, ke miaj kolegoj kaj aliaj interesatoj pardonos al mi, se mi intrudas privatajn opiniojn en ĉi tiun skizon de la Esperantista instruista movado, ĉar mia celo estas pensigi la samprofesulojn pri nacia kaj internacia agado.

Laŭ informo en la *Enciklopedio de Esperanto*, jam en 1910 kunligiĝis 347 Esperantistaj instruistoj diverslandaj en Internacia Asocio de Instruistoj kaj eldoniĝis *Internacia Pedagogia Revuo*. La kasisto kaj redaktoro estis ĉeĥoslovaka instruisto, nomita Ĉejka. La revuo estis bona, sed la redaktoro plendis pri manko de kunlaboro kaj pri indiferenteco.

Post la unua mondmilito renaskiĝis forta volo al internacia interkompreno inter la instruistoj. Francaj gekolegoj iniciatis agadon, kaj en 1922 Marcel Boubou, Orléons, eldonis edukfakan revuon *Novaj Tempoj*. La revuo pritraktis edukajn problemojn laŭ socia kaj politika vidpunktoj kaj estis serioza kaj notinda.

Dum Universala Kongreso en Vieno en 1920, 200 Esperantistaj instruistoj fondis la Tutmondan Asocion de Geinstruistoj Esperantistaj (TAGE). La celoj estis:— kolekti ĉiujn Esperantistajn instruistojn por efike propagandi la enkondukon de Esperanto en la lernejon kaj instruistaron, kaj eldoni pedagogian fakrevuon (*Novaj*

Tempoj). Ĉar la Saksa Asocio de Esp. Instruistoj estis la plej forta unuiĝo, ĝi ricevis la komision kaj la respondecon por la eldono de la gazeto kaj la administrado de TAGE.

Je ĉi tiu punkto mi deziras emfazi, ke por efika detala administrado estas necese, ke la oficistoj estu en unu lando; alie ili ne povas facile kunveni aŭ eĉ korespondi rapide; krome, ke ordinare la oficistoj de Esperantistaj societoj ricevas nenian financon helpon. La grandaj landaj profesiaj asocioj havas, pro membroj kaj kotizoj, sufiĉe da mono por pagi salajrojn al oficistoj, kies tuta tempo disponiĝas je la asocio, kiu krome havas propran oficejon.

Prezidantoj de TAGE estis Marcel Boubou (Francujo) ĝis 1926, Albin Nežil (Ĉeĥoslovakujo) ĝis 1929, G. Roome (Anglujo) ĝis 1935, Beckman (Svedujo) ĝis 1938, R. W. Hamilton (Anglujo) de 1938. De 1926 la organo de TAGE nomiĝas *Internacia Pedagogia Revuo* (IPR). En 1922 estis 150 abonantoj, en 1930 883 kaj en 1932, pro ekonomia kaj politika mondkrizo, 600.

Ĝis 1928 la administranto de IPR devis solvi ĉiujn taskojn kaj problemojn de TAGE, sed en tiu jaro D-ro Dietterle (Leipzig) aranĝis regulajn kunsidojn de reprezentantoj de *Kunlaborado*, de IPR, kaj de Saksa kaj Germana Asocio de Esperanto-Instruistoj. El tiuj kunsidoj estiĝis oficiala TAGE laborkomitato, kiu kunvenis ĉiunmonate en Riesa.

Necesas klarigo pri *Kunlaborado*. Ĝi estis arango inter IALA (International Auxiliary Language Association), Internacia Eduka Oficejo en Genevo (Prof. Bovet) kaj Germana Esperanto-Instituto (D-ro Dietterle) por esplori la utilon de Esperanto kiel helpilingvo pere de testoj kaj alimaniere.

La gazeto enhavis artikolojn pri internacia scienca pedagogio, Esperanta lingvoscienco, pedagogia terminaro en Esperanto, recenzojn de diversaj pedagogiaj libroj kaj Esperantaj verkoj, raportojn pri kongresoj kaj laboroj de internaciaj edukaj asocioj, pri instruistaro en diversaj landoj kaj pri Esperanto en tiuj medioj. Aldono al IPR estis la listoj aranĝitaj de la korespond-oficejo de *Kunlaborado*, enhavantaj la adresojn de lernejoj, klasoj kaj geinstruistoj por interŝanĝo de leteroj kaj aliaj aferoj, sub la gvidado de F-ino Marta Moelke.

TAGE restis sendependa asocio pro la fakto, ke ĝiaj membroj estis anoj de diversaj organizaĵoj, kaj ĉar ĝi havis specialajn, memstarajn taskojn. La abonprezo de IPR (kun membreco de TAGE) estis en 1929, kiam mi aniĝis, 3 ŝil. anglaj, 4 svizaj frankoj, 1 dol. usona, kaj estis 22 landaj agentoj.

Dum la Universalaj Kongresoj okazis TAGE kunvenoj, kiam oni pritraktis edukajn aferojn. Ĉiam laŭ mia sperto, ili allogis multajn personojn kaj la nomo de TAGE eĉ nun en la menso de multaj personoj estas sinonimo por instruista kunveno.

En Aprilo 1930 D-ro Dietterle raportis: 5000 ĝeinstruistoj en 55 landoj kaj 745 lernejoj en 38 landoj, kie oni instruas Esperanton. Ĉe la Oksforda Kongreso en 1930, li raportis: 907 anoj de TAGE en 37 landoj, 530 germanaj kaj 377 negermanaj, kune kun multaj aliaj interesaj detaloj.

Entute estis vigla agado. Tamen oni ne sukcesis aŭ anigi ĉiujn Esperantistajn instruistojn al TAGE aŭ unuigi la diverslandanojn laŭ landaj asocioj, sekcioj de TAGE.

1933 estis katastrofa jaro. La germanaj oficistoj en la komenco de la jaro, pro malfacilaj cirkonstancoj deziris ekŝiĝi. La administradon transprenis Nederlandanoj, sed oni ankoraŭ redaktis IPR en Germanujo. Aperis numero kun artikolo nomita *Nacia renoviĝo en Germanlando*. Ĝi kaŭzis eksplodojn kaj estis la lasta el tiu redakto. En la Kongreso en Kolonjo dum la somero, S-ro Roome, tiama prezidanto, estris kunvenon sen protokolo, sen sekretario, sen financa raporto. Tiu kunveno transdonis la organizadon de TAGE al komitato de Nederlandanoj, kiuj kuraĝe akceptis ĝin. Ankoraŭ unu numero de IPR aperis en 1933 en Decembro, sen kovrilo, kvazaŭ senhăutigita.

La nombro de membroj malgrandiĝis ĝis 340, pro la fakto, ke la Germanoj estis proksimume duono de la anaro. En la kaso estis 180 svizaj frankoj. Multaj ne pagis por 1933. Tamen en 1934 oni anoncis la aliĝon de la Sveda Federacio de Esp. Instruistoj. Tio multe helpis.

En la jaro 1932, mi mem fariĝis agento por Britujo kaj iom post iom koniĝis kun la afera flanko de la movado. Dum mia korespondado kun membroj mi ricevis sciigojn pri ekŝiĝo, ĉar oni diris, ke ne estas eble pagi tiom da mono por faka societo, krom pagi al la loka grupo, la nacia societo internacia asocio ktp. Oni ankaŭ demandis, ĉu la gazeto efektive valoras tiun sumon. Por la Angloj, la prezo estis fine fiksita je 5 ŝil. kvankam la baza kosto laŭ nederlanda kurzo estis pli alta.

La administracio, estrita de S-ro P. Korte,

iniciatis multajn interesajn projektojn, ekzemple 4-paĝan folieton da porinfana literaturo; TAGE bibliotekon, el kiu unu libro eldoniĝis; proponon pri geografiaj bildoj, kun Esperanta teksto; kolektadon de infandesignaĵoj por ekspozicio; kolektadon de paraĝrafoj el historiaj lernolibro en lernejoj, kiuj pritraktas la mondmiliton. Estis ankaŭ specialaj numeroj de IPR pri pola, sveda kaj estona edukado kaj multaj naciaj specialaĵoj. Eĉ ĝis 1937 F-ino Moelke alvokis helpojn pri korespondlistoj, sed nur unu aŭ du aperis kaj tiuj post longa intertempo, do ili ne estis ĝisdataj. Oni plendis pri la neofteco de la listoj kaj proponis, ke IPR anoncu nomojn. Tio estis farita.

Ĉiam la administranto anoncis kaj bedaŭris la mankon de subteno. Dum la Internaciaj Kongresoj okazis TAGE kunvenoj, sed ili plejparte dependis de la iniciato de lokaj samideanoj, kaj ŝajne ne estis sufiĉe da responda kunlaborado kun la TAGE laborkomitato. Kelkofoje oni faris rezolucion aŭ starigis grandiozan projekton, sed mankis personaj intertilatoj kun la gvidantoj de TAGE kaj la membroj tiuokaze, kaj TAGE mem ne povis efektiviĝi la rezoluciojn. Dube estas, ĉu tiuj, kiuj partoprenis TAGE kunvenojn kaj subtenis rezoluciojn, estis aŭ ĝeinstruistoj aŭ TAGE-anoj.

Tamen la komitato streĉe laboris. Oni eldonis la revuon 6 fojojn jare kun tre interesaj artikoloj kaj raporto. Je la fino de 1938 estis 362 TAGE-anoj en 32 landoj. La plej grandaj landnombroj estis: 28 en Britujo, 29 en Britujo, 45 en Ĉeĥoslovakujo, 60 en Nederlando, 91 en Svedujo.

En 1938 okazis la Internacia Kongreso en Londono, kie estis publikaj kunvenoj de TAGE kaj speciala kunveno de la anoj por diskuti la aferojn. Kvankam pli ol 100 personoj partoprenis la publikajn kunvenojn, nur 13 anoj partoprenis la laborakunsidojn, el kiuj 12 estis Britoj. Estis tre malfacile fari utilan laboron en tiuj cirkonstancoj.

Mi mem konvinkiĝis, ke ne estas eble sukcese daŭrigi agadon inter ĝeinstruistoj sen naciaj organizaĵoj, kiuj havu siajn reprezentantojn en kunvenoj aŭ almenaŭ sendu raportojn. Ne estis eble starigi sekciojn de TAGE pro la alta kotizo kaj manko de sufiĉe da intereso. Mi forte subtenis la ideon, ke TAGE filiĝu al IEL por ke ĝi havu pli da reklamado pere de kunlaborado kun granda asocio, kaj por ke la aliĝpagoj estu pli malaltaj por rabato.

En 1938 IPR anoncis interkonsenton kun IEL. Ĝi ankaŭ deziris efektiviĝi similajn aranĝojn kun SAT kaj aliaj internaciaj organizaĵoj por esti tute neŭtrala. En 1939 BEA fariĝis agento en Britujo.

Mi nun venas al la nacia flanko.

En Januaro 1939 fondiĝis Societo de Britaj Esp. Geinstruistoj (SBET). La Eduka Komitato de BEA iniciatis ĝin. SBET estas memstara societo kun sia propra komitato. La minimuma kotizo estas unu ŝilingo, por ke neniu estu malhelpata pro alta kosto, tamen, laŭeble oni pagas pli. Ni havis 91 anojn. De tiu tempo ni duobligis la membraron kaj je la fino de 1944 havis 168 (pli ol tiom nun). El ili 119 estas en kategorio A—profesiaj geinstruistoj en ĉiuspecaj lernejoj, kolegioj kaj universitatoj. En kategorio B estas Esperantistoj, kiuj estas kursgvidantoj en vesperaj lernejoj kaj similaj institucioj. En kategorion C ni akceptas edukistojn, ĉu Esperantistojn aŭ ne, kiuj aktive subtenas nian laboron, ekzemple lernejestron, kiu permesas la instruadon de la lingvo en la lernejo. Ni kunligas niajn anojn per bulteno trifoje dum la jaro, aranĝas konferencojn kaj somerajn lernejojn; per speciala kaso ni dum la milito eldonis tri malgrandajn librojn por popollernejoj kaj efektive fariĝis informejo pri lernejoj kaj instruistaj aferoj. La Eduka Komitato de BEA likvidis sin en 1944 opiniante, ke SBET estas kapabla pritrakti edukajn problemojn kaj agadon. Ni konservas la plej amikan kunlaboradon kun BEA, kaj ties poreduka Sekretario, S-ro M. C. Butler, estas ano de nia komitato. BEA helpas finance se grava afero stariĝas, ekzemple la nuna klopodo enkonduki Esperanton en la lernejan diplomon. La Brita Sekcio de TJO laboras kun ni. Ni nepre evitas konkuradon. Unu el niaj anoj, kiu ankaŭ estas kunlaboranto de TJO, lastatempe entreprenis la peradon de korespondado inter lerneĵanoj.

Ni estas pretaj kaj avidaj kunlabori kun niaj kolegoj en aliaj landoj kaj jam efektivigas interrilatojn kun la Franca Instruista Asocio.

Ĉu internacia asocio estas necesa ?

Se en ĉiu lando nacia instruista asocio aŭ fako fondiĝus, kun sia propra bulteno kaj laborkomitato, ĉi tiuj asocioj povus per interŝanĝo de bultenoj inter la Sekretarioj facile informiĝi pri la agado unu de la alia, kaj laŭ cirkonstancoj povus ĉiujare aranĝi fakkunvenon aŭ samtempe kun Internacia Kongreso aŭ aparte. Por eviti la koston de faka gazeto en la nuna tempo (laŭ financa raporto, proksimume du-trionoj de la enspezoj por la jaro 1938 elspeziĝis por la presado kaj ekspedo de IPR) la internaciaj gazetoj sendube konsentus presigi artikolojn pri edukaj aferoj kaj fari anoncojn aŭ akcepti reklamojn.

Aliflanke oni ja bezonas internacian centran informojn kaj eble de tempo al

tempo bultenon (NE multekostan gazeton). Ni ankaŭ bezonas ian konsentitan internacian organizaĵon, kiu povas reprezenti nin inter aliaj mondaj asocioj.

Pli bone estus, ke ni ne pripensu tion ĝis almenaŭ kvar aŭ kvin naciaj instruistaj asocioj povu rekte pritrakti la aferon pere de la sekretarioj aŭ tiucelaj reprezentantoj. Ĝis nun internacia asocio ne bone funkciis aŭ ludis indan rolon. Sen nacia bazo (ampleksa kaj multflanka laŭ anaro, kaj modesta laŭ kotizo) mi dubas, ĉu tia iam povos realiĝi. Ni rigardu la faktojn, kiuj povas konkondi nin al pli granda sukceso en la estonteco. Ne vane malŝparu la entuziasmon kaj la optimismon.

V. C. Nixon, Anglujo

RESPONDKUPONOJ

Ŝajne necesas klarigo pri tio, kio estas respondkuponoj. Internaciaj respondkuponoj estas aĉeteblaj en poŝtofiĉejoj, kaj kiam ili estas senditaj al alia lando oni tie ricevas ĉe la poŝtofiĉejo por ĉiu la valoron de la afranko de simpla letero al eksterlando.

Ilin aĉetante, oni zorgu notu, ke la stampo de la eldonanta oficejo estas farita sur la ĝustan lokon; alie, la kupono estas senutila.

Ili estas tre utilaj por fari malgrandajn pagojn en alia lando, sed por pli grandaj pagoj ili ne taŭgas, ĉar ĝenerale la interŝanĝvaloro estas nur duono de la kosto.

Oni ne konfuzu respondkuponojn kun servokuponoj de IEL. Tiuj lastnombitaj estas legitimiloj de IEL-membroj en okazoj de servopetoj ĉe Delegitoj.

LA FONTO KLARA

Sola iris mi
Ĝis la fonto klara,
Sed ne venis vi,
Amatino kara.

Kreskis ĉe la font'
Kun fluaĵ' bongusta,
De l' sovaĝa mont'
La filiko rusta.

Falis kiel plor'
La kristalaj perloj ;
Tie flugis for
La fajfantaj merloj.

Longe vagis mi
En malhel' arbara ;
Sed ne venis vi,
Amatino kara,
Ĝis la fonto klara.

Lucien Thévenin, Francujo

NI ORDIGU NIAN DOMON

Kun plezuro mi legis la artikolon en *E.I.* p. 85 (1945) en kiu oni pritraktas la multajn novajn gazetojn kaj ĵurnalojn nun ĉie aperantajn. Mi citos elĉerpaĵon: "Estas loko . . . por kelkaj novaj gazetoj, speciale fakaj, sed estos pli bone vidi dek fortajn kaj bonajn gazetojn ol cent, kiuj enhavas nur po kelkaj paĝoj malbone presitaj sur malbona papero, kaj kiuj mem vegetas kaj samtempe malhelpas al la sukceso de la aliaj."

Tiuj vortoj meritas la pripenson de la Esperantistoj ĉie. Ĉu la samideanoj samopiniis? Mi opinias, ke ne! Tute ne! La Esperantaj gazetoj aperu tiom amase kaj tiom diverse kiom eble. Ni ĝoju pri la apero de ĉiu nova gazeto—ju pli da presaj, des pli da verkantoj. Tio ne malhelpas al la sukceso de la aliaj. Se ekzistus nur dudek gazetoj, kaj se niaj samideanoj, daŭre subtenantaj tiujn dudek, ne sentus inklinon eldoni novajn, tiam nia tuta vigla movado ja vegetus.

La afero, tamen, estas pripensinda pro speciala kialo. Ni fanfaronis dum malpleje dek jaroj pri *Esperanto* en la *ordinara vivo*, sed rigardu la gazetojn! Preskaŭ senescepte, neniu el ili sin dediĉas al la praktika uzo de nia lingvo. Eĉ *Heroldo*, kiu siatempe presis ordinaran novaĵon el ĉiuj mondpartoj, enhavis tre ofte la *problemojn de la Esperantistoj*; kaj *Katolika Vivo*, kiu sin dediĉis al ordinaraj aferoj de katolikoj tra la mondo, tre ofte—tro ofte—pritraktis *Nian Nunjaran Kongreson de Katolikaj Esperantistoj* kaj simile. Venadas al mi gazetoj dum dekkvin jaroj kaj al ties redaktoroj mi kore dankas; sed ho ve! kiam mi tralegas ilin! Preskaŭ ĉiam, ĉio, ĉio pri Esperanta vivo! Preskaŭ nenio pri la ordinara vivo!

Nu, mi allasas, ke gazetoj, kiuj pritraktas la vivon de la samideanoj estas necesaj, se nur por doni informon pri la sukcesoj k.t.p. de la movado. Malgraŭ tio, mi firme kaj certe opinias, ke ili devus stari en la dua vico, kaj ne en la unua. Tion farinte, ni havus, supozeble, en ĉiu lando, unu aŭ plurajn novaĵgazetojn, kiuj cirkulus tra la mondo. Ekzemple Irlando povus ricevi, per abono al ili, la plej fidindan kaj detalan informon el Belgio, Francujo, Nederlando, Islando, Norvegujo k.t.p. Tiam vekigus intereso pri Esperanto ĉe ĵurnalistoj, kiuj sin turnus al la novaĵgazetoj por informo; parlamentanoj legus ilin kaj lernas Esperanton tiucele. La sperto en Irlando instruis al ni, ke Esperanto estas bagatelo. Kio estas grava por registaroj, administrantoj, policedoj, redaktistoj kaj komercistoj estas la faktoj, kiujn ili lernas. *La faktoj, ĉiam la faktoj*;

ne gravas al ni ĉu estas franca aŭ greka lingvo, ili diras.

Brazilo akiris la subtenon de la registaro ĉar oni uzis Esperanton en la praktiko. Mi esperas, ke baldaŭ ni vidos ĉiumonatan aŭ ĉiusemajnan gazeton pri brazila ordinara vivo sendepende de *O Brazil Esperantista*.

La redaktistoj de tiaj novaj gazetoj diru, "Esperanto ja venkis, ĝi estas uzata en ĉiuj landoj, do ni provozos nenion pri la Esperanta vivo". Tio skuos la samideanojn! Ĉu vi samopiniis?

Rilate al la primovadaj gazetoj, tiuj koncernu sin ekskluzive pri la Esperanta vivo. En la unua loko staru *Esperanto Internacia*, provizante la plej lastatempajn kaj plej gravajn sciigojn pri Esperantismo ĉie. Jen kritiko pri la Nov.-Dec. 1945 kajero de *E.I.* La antaŭparolo estas grava kaj necesa por direkti la pensojn; la *Informoj el Pollando*; *En Danujo dum la Milito*; *Flandra Ligo dum la Milito*; *Pajleroj*; *Radio*; *Recenzoj*; *Oficiala Informilo*; *Reklamoj* estas tre taŭgaj laŭ mia opinio. *E.I.* ĉiam donu tiajn informojn kaj forjetu literaturajn (*Palestina Kolonio*, *Postmilitaj Domoj*, *Poezio* k.t.p. kiuj okupis ses valorajn paĝojn.)

Nia lingvo estas por praktikaj celoj. Pro tio ni havu **NOVAĴOJN** en la unua vico; **PRAKTIKAN INFORMON** pri la movado en la dua vico; tio lasos al ni **LITERATURON** kaj **SCIENCON**. La gazetoj, kiuj pritraktas tiajn aferojn estu en du aliaj vicoj. Ni legu la plej freŝdatajn originalajn kaj tradukajn verkojn; kaj ni sciu la plej detalajn faktojn pri novaj eltrovoj de la sciencistoj.

Laŭ tiu plano ni legus nenion (aŭ preskaŭ nenion) en la fakaj revuoj pri la Esperanta movado. Sed faka revuo, ekzemple *Polica Gazeto*, priskribus policajn aferojn, legindajn kaj gravajn por policanoj kaj policedoj, administrantoj, k.t.p. en aliaj landoj.

Resume do:

Unua Vico—Ĉiuj gazetoj, kiuj koncernas sin nur pri ordinara novaĵo. Ili preskaŭ neniam menciuj Esperanton.

Dua Vico—Ĉiuj gazetoj, kiuj koncernas la Esperantan movadon, kun *E.I.* kiel ligilo.

Tria Vico—Literaturaj, sciencaj, kaj Fakaj Revuoj, kiuj preskaŭ neniam mencias Esperanton.

Kion vi opinias?

Lorcán O hUiginn, Irlando

Noto de la Red.—Ni bonvenigos opiniojn, sed ili estu tre koncize esprimitaj, kaj sur aparta papero: t.e. ne kiel parto de letero pri aliaj aferoj.

TIO, KION KANTADAS LA BIRDOJ

En belega printempa mateno mi promenadis kun du amikoj, soldatoj el Kanado, inter la boskoj de belega privata parko, tia kia ankoraŭ estas trovebla kelkloke en Anglujo.

La dolĉa laktomilda aero venis al ni, ŝarĝite de odoroj el printempaj floroj; kaj la kantado de sennombraj birdoj aŭdiĝis el apudaj arbustaroj.

"Kiel belege ili kantas!" mi diris al Kaporalo Robins, kiu marŝis ĉe mia dekstra flanko. "Kaj kiom mi ŝategas la kapablon kompreni tion, kion ili diras unu al la alia, kiel ekzemple, laŭ la legendoj, kapablis niaj praavoj. Kia domaĝo estas, ke neniu homo nuntempe posedas tiun povon!"

"Nu, mi ne volus diri 'neniu homo'" respondis Kaporalo Robins. "Jen ĉe via flanko marŝas Serĝento Marteno. Lia vera nomo en sia tribo estas 'Mustelombro' kaj li estas Indiano pursanga kaj krom tio li estas 'medicina homo'. Tio signifas, laŭ niaj ideoj, magiiston. Li kutimiĝis babiladi kun la sovaĝaj birdoj kaj bestoj de la vasta soleca nord-okcidento de Kanado. Nur estu al li afabla kaj li rekompence klarigos al vi la dirojn de kiu ajn birdo."

Mi turnis min al mia alia kunmarŝanto, kiu ĝis tiam malmulton aldonis al nia interparolo.

"Ĉu vi efektive estas magiisto, Serĝento? Aŭ ĉu la Kaporalo nur ŝercas?"

Serĝento Marteno estis seriozaspekta, brunhaŭta hoknaza homo, kiu malmulte parolis, sed marŝis ĉe mia flanko silenta kiel ombro. Tamen ĉu mi rimarkis ekbrilon de rido en lia okulo?

"Ne magiisto, Fraŭlino. Tio, kion vi eble nomus magio, estas nur parto de la komuna ĝenerala scio de miaj samtribanoj. Tamen estas vere, ke mi faris specialan studon pri mia fako."

"Tamen ĉu vi efektive povas kompreni la ideojn, kiujn volas esprimi la diversaj sonoj kaj notoj de la birdoj kaj bestoj? Ĉu povas esti, ke ili entenas ideojn, krom timo, kolero, plezuro kaj tiaj emocioj?"

"Ho jes! Tiu kapablo ne bezonas magion, sed nur observadon kaj atenton krom, kompreneble, la helpo de instruisto dum la tempo de la studado."

"Ĉu vi povas kompreni, ekzemple, kion diras tiu palumbo, kiu nun kveras en tiu arbo?"

"Nu, ĝi ne elbuŝigas siajn sonojn ĝuste laŭ la maniero de la Kanadaj palumoj, tamen la senco estas rekonebla; tiu estas simpla amfrazo. Eĉ vi mem povas rekonii kaj traduki ĝin. 'Mi amegas vin, karulino! Mi amegas vin, karulino! Mi amegas vin, karulino! kaj tiel plu senfine.'"

"Jes mi supozas, ke vi estas prava. Sed tiu turdo, ĝi havas plurajn frazojn; ĉu vi povas traduki ilin aparte?"

"Aŭskultu dum momento" diris la serĝento kaj li prenis el la poŝo papereton sur kiun li skribis. Li atente aŭskultis la turdon kaj skribis. Fine li transdonis al mi la paperon kaj mi povis legi,"

Jen mi! Jen mi! Jen mi! Jen mi!

Turdo! Turdo! Turdo! Turdo!

Aŭskultu! Aŭskultu! Aŭskultu!

Mia la ĉielo! Mia la tero!

Mia ĉio! Mia ĉio! Mia ĉio! Mia ĉio!

Jen mi! Jen mi! Jen mi! Jen mi!

k.t.p.

"Vantema birdo, ĉu ne?" mi diris al mia amiko.

"Jes ja, preskaŭ homa" li respondis.

"Nu, kion pri tiu rubekolo, kiu prikantas sendube la belecon de la printempo, jen sur tiu pirarbo. Kion ĝi diras? Kredeble ĝi estas la vera minstrelo de la naturo."

"Minstrelo ĝi ja estas; tamen ĝi ne prikantas la gloron de la naturo. Redonu, mi petas, la paperon kaj mi tradukos elĉerpaĵon de ĝia kanto."

Jen la elĉerpaĵo, kiun li faris:

"Aŭskultu! Jen birdaĉoj de ĉi tiu tereno!

"La ĉirkaŭaĵo de la arbustaro apartenas al mi!

"Ĉio en ĝi estas mia. Foriru do vi paseraĉoj!

"Kaj ankaŭ vi rubekoloj! Se mi vin kaptos en mia teritorio mi elŝiros de vi la intestojn kaj manĝigos ilin je la doma kataĉo!

"Foriru do! Foriru do! Foriru!"

Mi legis la skribajon kun iom da dubo. Ĉu li ŝercas? Li aspektas tute serioza. Mi faris alian provon. En apuda heĝo, parvulo ŝajne havis multon por diri kaj mi petis la serĝenton, ke li traduku por mi.

La serĝento seriozmiene aŭskultis la birdeton kaj post iom da tempo sin turnis al mi. "Fraŭlino," li diris, "mi ne kuragos ripeti al vi tion, kion diradas tiu diableto. Ĝi ne estas deca por la oreloj de civilizita sinjorino."

C. Ashmore Baker, Anglujo.

Sveda Radio—Dissendo en Esperanto okazos la 16an de aprilo je 15.10–15.30 laŭ Greenwich sur ondo 19.80 m. Ripeto de la programo por ekstereŭropaj landoj la 17an de aprilo je 1.10–1.30 sur ondoj 31.46 kaj 49.46 m. Ankaŭ en venontaj monatoj je la samaj horoj kaj datoj. Skribu al Sveda Esperanto-Instituto, Tegelbacken, Stockholm.

ENIGMA KONKURSO No. 3

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Général Lotz 106, Brussel-Uccle, Belgujo.

Solvoj de la enigmo en la konkurso No. 1

Krucvort-enigmo

TRANĈIL* T* KORIDOR
R* KUIR* ŜIA* NEĜO* E
AMARE* AMORF* ĜIRAF
PER* LUTI* MEDI* NEI
ATOL* MORBILO* KORK
SI* AG* M* A* O* JA* OS
I* UTIL* IST* MULO* I
* KRITIKA* EMINENT*
K* STAT* MOR* LINI* P
AL* UR* B* P* B* OD* PO
SALD* ARSENAL* OBOL
ECO* SLIP* ERAR* REV
RAKET* DIKTI* IMITI
O* I MAG* REE* SPAD* G
LOGIKEC* L* BIOLOGI

Kaŝ-enigmo

Tulipo – gladiolo – tusilago – lekanteto – portulako – ajlo – arumo – mento – eriko – akonito – nufaro.

Ŝanĝ-enigmo

1. fero – felo – falo – kalo – kaĉo. 2. lakto – fakto – farto – forto – fonto – ponto – poeto – poemo – premo – kremo. 3. herbo – verbo – vorto – varto – karto – lakto – lakto. 4. floro – flaro – flano – plano – piano – liano – lieno – mieno – mielo. 5. roko – koko – koro – kero – aero – akro – akvo. (pluraj solvoj estas eblaj kaj estis aprobatataj).

Novaj Enigmoj :

SILAB-ENIGMO

ar – bro – bu – bur – do – do – e – es – ge – gi – i – im – im – ka – kan – ke – ko – ko – le – le – le – lek – les – lip – na – nar – ne – ni – no – no – no – nos – o – o – o – ob – ok – om – par – pe – pla – por – pro – ri – ser – si – so – so – so – tal – te – ti – to – tro – tu – vem – vi – vi – zi.


El la supraj 59 silaboj formu 16 vortojn, kies unuaj literoj, legataj de supre mal-supren, formas konatan esprimon. Jen la signifoj de la vortoj :—

1. astro rondiranta ĉirkaŭ la suno ;
2. afrika rabobesto el la familio de la katoj ;
3. arbeto ĉiam verda kun brilglataj pikaj folioj ;
4. ekstravagance komika ;
5. nebruligebla gaso sed nepre necesa por brulado ;
6. sopiro al patrolando ;
7. gaja burleskulo ;
8. plej alta titolo por regnestroj ;
9. rigardi ion kun daŭra atento ;
10. facile uzebila ;
11. kampa fioreto, jam

frue aperanta ; 12. parto de la jaro ; 13. kurba linio sekvata de astroj ; 14. drogo, per kiu oni povas dormigi iun ; 15. tuj kaj senprepare verki ; 16. kovrita publika veturilo.

5 poentoj.

MAGIAJ KVADRATOJ



Klopodu plenigi la kvin kvadratojn de la supra figuro tiel, ke en ĉiu kvadrato vi legos tiel horizontale kiel vertikale la samajn vortojn aŭ vortradikojn.

Por plenigi la kvar malgrandajn kvadratojn, vi uzu la jenajn vortojn : abon – amat – avel – bari – boru – eben – erar – eter – lapo – nilo – nura – oliv – orel – peti – rave – vane.

Por plenigi la mezan pli grandan kvadraton vi uzu la literojn : a – a – a – a – d – e – e – i – i – k – k – l – m – m – n – n – n – n – o – o – o – o – r – r – r.

5 poentoj.

Strangaj demandoj ! (Ensendis S-ro X el Belgujo) —

Kial basulo ne timas hundon ?

Faru imperiestron el legomo kaj besto.

Kiu balo estas la plej brua ?

Ki kiu mulo oni ne povas fidi ?

Kiun anason oni povas manĝi kruda ?

Skribu per unu litero trisilaban vorton !

Po unu poento por ĉiu ĝusta respondo.

Anonceto—Esperanto-Klubo "Antaŭen", Hämeenpuisto 31 B 18, Tampere, Finnlando, aranĝos letervesperon dum majo kaj atendas tiam korespondataĵojn de ĉiulandaj samideanoj.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

N-ro 180

OFICIALA INFORMILO

4an Marto 1946

NOVA ĈEFDELEGITO

Ernest Kasović, Gradska ŝtedionica, Jelačićev trg 10A, Zagreb, Jugoslavujo.
Tel : 22-3-44.

NOVAJ DELEGITOJ

Jen la stato ni enskribis tiom da novaj delegitoj ke estas tute neeble listigi ilin en la gazeto. La unua parto de la Jarlibro estas nun kompostata, kaj ĝi enhavos informon pri ĉiuj delegitoj enskribitaj ĝis la nuna dato. Espereble ĝi aperos fine de Aprilo.

STATISTIKO

Jen la stato de la membraro je la fino de Februaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de Februaro 1945 :

	1945	1946
Asociaj Membroj ..	2209	2963
Individuaj Membroj :		
MJ	387	559
MA	911	2236
MS	76	183
Patronoj	20	20
DM	72	90
HM	8	20
	— 1474 —	3108
	3683	6071

PATRONOJ

16. S-ro J. H. Murray, Dearborn, Mich., Usono.
17. S-ro H. Reed, Letchworth, Anglujo.
18. S-ro N. Wooding, Leicester, Anglujo.
19. S-ino M. C. Gillett, Banbury, Anglujo.
20. S-ino A. L. Blacklock, Banbury, Anglujo.
21. D-ro W. A. Gibson, Bathgate, Skotlando.

MEMBRO-SUBTENANTOJ

144. S-ro R. Redhead, Victoria, B.C., Kanado.
145. S-ro A. Nelson, Bolton, Anglujo.
146. S-ro H. Huisjes, Gasselternijveen, Nederlando.
147. S-ro F. J. Belinfante, Leiden, Nederlando.
148. S-ro G. J. D. Dijsselynck-Bral, Terneuzen, Nederlando.
149. S-ro F. Weeke, Den Haag, Nederlando.
150. S-ro E. V. Ahlin, Brovallen, Svedujo.
151. S-ro M. Fejde, Jönköping, Svedujo.
152. F-ino I. Kristoffersson, Stockholm, Svedujo.

153. S-ro E. Malmgren, Stockholm, Svedujo.
154. S-ro O. Olsson, Vimmerby, Svedujo.
155. S-ro H. F. Turner, Hackefors, Svedujo.
156. F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo.
157. S-ro K. Wästfelt, Stockholm, Svedujo.
158. S-ro B. Zell, Göteborg, Svedujo.
159. S-ro A. Souaki, Port Said, Egiptujo.
160. D-ro Tadors Megalli, Cairo, Egiptujo.
161. S-ro W. G. Kellaway, Exeter, Anglujo.
162. S-ino F. W. White, Bournemouth, Anglujo.
163. F-ino E. Walters, Horncastle, Anglujo.
164. D-ro S. Liebeck, Cape Town, Sud-Afriko.
165. S-ro A. Clavenna, Genova, Italujo.
166. S-ro A. Pitkämäki, Palosaari, Finnlando.
167. D-ro E. Tudela Flores, Valencia, Hispanujo.
168. D-ro D. di Demetrio, Bari, Italujo.
169. Prof. L. Taccani, Forlì, Italujo.
170. S-ro E. Zumbo, Firenze, Italujo.
171. Prof. W. E. Collinson, Liverpool, Anglujo.
172. S-ro C. A. Baker, Exeter, Anglujo.
173. S-ro R.N. Whitcomb, London, Anglujo.
174. F-ino S. M. Sturge, Birmingham, Anglujo.
175. S-ro A. Caetano Coutinho, Rio de Janeiro, Brazilo.
176. D-ro A. Couto Fernandes, Rio de Janeiro, Brazilo.
177. S-ro I. Gomes Braga, Rio de Janeiro, Brazilo.
178. Kapt. N. Ladany, Rio de Janeiro, Brazilo.
179. S-ro H. Leite Pinho, Rio de Janeiro, Brazilo.
180. S-ro A. José Vaz, Rio de Janeiro, Brazilo.
181. S-ro A. Brito, São Paulo, Brazilo.
182. Kol. Salvador de Moya, São Paulo, Brazilo.
183. S-ro O. S. Magnússon, Reykjavík, Islando.
184. S-ro R. G. Robbins, Wanganui, Nov-Zelando.
185. D-ro Mario de Caires, Lisboa, Portugalujo.
186. S-ro T. C. Baillie, Eynsford, Anglujo.
187. S-ro D. P. Boatman, Westcliff-on-Sea, Anglujo.
188. S-ro L. A. Churchill, Derby, Anglujo.
189. Kapt. G. D. Denlow, Kingston, Anglujo.
190. S-ro F. Kennedy, London, Anglujo.
191. S-ro R. N. Hanney, London, Anglujo.

DONACOJ por helpi al la forigo de la defcito : B. Lavén 7ŝ., S-ino M. C. Gillett 30ŝ., S-ino A. V. Morris 32ŝ. 6p., E. Mila 4ŝ. 6p., I. M. Rodriguez 4ŝ.

DONACOJ al la Zamenhofa-kaso : W. A. Morrison 3ŝ., Worthing-Grupo 7ŝ., Gesroj. Hanks 40ŝ.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

CECIL C. GOLDSMITH, *Sekretario*

ESPERANTO KAJ SKOLTISMO

Kun granda ĝojo mi legis la sciigojn pri la revekiĝinta fervoro de niaj gesamideanoj, kiuj eluzas ĉiujn eblecojn por prosperigi nian movadon.

Tiujn ĉi fervorajn pacbatalantojn mi volus atentigi pri aktuala laborkampo kies zorgema kulturado nepre alportos siajn fruktojn. Temas pri skoltismo. La skoltoj vivas laŭ siaj dek leĝoj fiksitaj de la fondinto de la movado—Lordo Baden-Powell. Laŭ la kvara leĝo ili promesas *esti frato al ĉiu skolto*. La skoltoj ne disigas religia, nacia, socia diferencoj; kontraŭe ilin ligas en frata amo la komunaj leĝoj, la komuna solena promeso, la komuna celo. Tiu ĉi celo estas: la pli nobla homo kaj la frata kunvivo de la popoloj. Por praktiki tiun ĉi fratecon la skoltoj aranĝas ĉiun kvaran jaron tutmondan tenderon, jamboreon. Tiuj ĉi jamboreoj havas multe pli multajn partoprenantojn ol niaj Esperanto-kongresoj, sed iliaj vizitantoj havas lingvan problemon.

Somere de la jaro 1947 okazos apud Parizo la unua jamboreo postmilita. Niaj samideanoj devus jam eklabori por varbi lernemulojn inter la skoltoj de sia urbo. Laŭ niaj spertoj lernas volonte ankaŭ tiuj, kiuj ne partoprenos la jamboreon se oni atentigos pri la eblecoj de interkorespondado. Estas konsilinde atentigi la varbotojn pri tio, ke la senco de ilia kvara leĝo estas parenca kun nia *interna ideo*.

Ni klopodas, ke inter la partoprenantoj de la venonta jamboreo estu multaj skoltoj kun la Esperanto-provinso kaj ni petas, ke la tutmonda gesamideano nin helpu per ĉiuj fortoj. Vizitu la skoltestrojn de via urbo, sendu artikolojn al la landaj aŭ regionaj skolt- kaj junularrevuoj, aranĝu kursojn ktp.

Ni deklaru la sekvontajn 12 monatojn, *jaro de skoltismo* kaj ni konstato, ke post la jamboreo, aŭtune 1947, ni havos aron da entuziasmaj kunbatalantoj en la vicoj de niaj fervoraj skoltfratoj. Estu preta!

Skoltofrato, Ĉeĥoslovakujo

LA LEGANTO PAROLAS

En la unua numero (vol. 10, 1946) oni petas konsilon por privatulo, per kiu li povus utiligi por la movado. Ĉu vi ridas? Ĉu ekzistas kontrasto pli granda; pli frapanta malsameco de ideoj—Esperantisto kaj privatulo? Ke Esperantisto, posedanta ilon grandegan por interrilatiĝi skribe kaj buŝe, sentu sin izola?

En la jaro 1946 ne scii, kiel utiligi sin por la Esperanto-movado, egalas al malatento intenca pri nia historio! Kiomofte oni ripetis la manierojn por kunlaborado? Jen: korespondado sur ĉiu imagebla tereno, voĉlegado (verkaro de Zamenhof), aboni gazeton, esti MA de IEL, aŭ pli prefere Dumviva Membro! skribi ĉiam Esperante, traduki el kaj en Esperanto atentigi gazetaron, gratuleteroj al radio stacioj, aĉeti librojn kaj gramafondiskojn, senĉesa instigado al geamikoj, gekonatoj, parencoj, parkere lerni poemojn, Esperante kalkuli kaj fari notojn, ĉiam porti verdan stelon, disdoni ŝlosilojn, en ĉiu okazo flirtigi verdan flagon, skribi kaj sendi al IEL redaktaĵojn, ĉiujn presaĵojn kaj kovertojn stampi per verdastelstampilo, kun superskribo *Lernu Esperanton!* fari duliniajn rimetojn kaj meti ilin kiel paĝindikojn en ĉiun libron de la biblioteko, glui stelojn sur adresflankon de poŝtaĵoj por ke poŝtistaro k.a. vidu, ktp. ktp. Ĉu sufiĉe? Koncize dirite, propagandu ĉiel.

Pri recenzoj; ĉu oni kuraĝus tiel ege detale montri mankojn de aŭtoroj naciaj? Nu, mi serioze deziras, ke ni de nun liberigu kaj senŝarĝigu de tiaj bagatelaĵoj, frivolaĵoj, nulaĵoj! Tiu ĉiama ĉikanado, tiu subtila kritikajo, tiu troa analizado ne taŭgas por maturulrevuo! Aŭ ĉu ni restos ĉiam komencantoj infanaj? Ĉu kateni nin per nenecesa cerbumado pri delikataĵoj nuancoj? Ni vivas en kortuŝa, emocia tempo, ne volante disponi tempon por tiaj malgrandajoj. Ni antaŭenkuregu!

“Kompetentaj estas la leĝoj, kreitaj de la granda parto de la verkantoj kaj parolantoj, la leĝoj de la plimulto. Oni ne povas kontraŭbatali la naturan iradon!”

(6a Kongresparolado en Washington 1910).

S. de Paauw, Nederlando

LA VELO

Venteto, kiu blovas
Sur mar' ŝipeton movas,
Kaj ties blanka velo
Glitadas en la helo.

La blanka velo brilas,
Kaj sur ĉiel' similas
Al la flugil' de laro
Vaganta super maro.

Lucien Thévenin, Francujo

I. A. P. K.

INTERNACIA ASOCIO DE POŝTMARK-KOLEKTANTOJ

Por ebligi al ni daŭrigi la eldonadon de nia Internacia Bulteno, kiu preparas la vojon al la eldonado de daŭra Filatela Revuo, ni devos havi ne malpli ol 2500 membrojn.

En Britujo nun estas 350 kaj la nombro kreskas ĉiutage. En Nederlando sin trovas proksimume 100. Nu, estas la vico de Belujo. Nia agento tie komencas viglan kampanjon kaj bezonas vian subtenon. La kvoto de Belujo estas malpleje 150.

La ĉiujara kotizo-abono estas 45 frankoj. Aliĝiloj k.t.p. estas haveblaj ĉe :—

S-ino M. de Rijcke, 26 Boulevard des Martyrs, Gent, Belujo, aŭ la Centra Oficejo, XPDO House, Didcot, Berks., Anglujo.

Nepre sendu afrankitan koverton kiam vi skribas al la Agento.

LA VERDA FLAMO

monata revuo eldonata en Maroko

Aperigas bonegajn artikolojn, informojn, interesajn kronikojn marokan kaj internacian pri E.-movado, novelojn, aktualaĵojn, krucvortengimojn, humorajojn, korespond-anoncojn, k.c.

Abono por 12 numeroj (12 paĝaj) jare : 6 anglaj ŝil., aŭ 1 dolaro, aŭ 60 marokaj frankoj, aŭ 15 internaciaj respondkuponoj.

Redakcio : 5 rue Savorgnan de Brazza, Casablanca, Maroko.

Abonoj akceptataj de IEL.

LA ISLAMA RELIGIO

"plenumas la Internan Ideon de Esperanto kaj la Idealojn de Zamenhof"

KIAL? . . . LEGU :—

ISLAMO ESPERANTISTE RIGARDATA

Originala verko de COLIN EVANS,
Angla Islamano kaj Fakdelegito de IEL por Islamismo.

§I : **De Mahometo al Zamenhof** : Komparo de Idealoj (paralela studado de Zamenhofaj verkoj kaj la Korano).

§II : **Resumo de Islamo** (detalaj doktrinoj kaj devoj).

§III : **Inj Miskomprenoj** (pri Poligamio, Privata Vivo de Mahometo, Fatalismo, "Volupta Paradizo", ktp.)

Afrankite :

10 pencoj Anglaj, aŭ 3 Respondkuponoj.

Mendu ĉe :

I K R O (Islama Koresponda Rondo),
10, St. Philips Place, London, W.2, ANGLUJO,
aŭ ĉe IEL.

NOVAJ LIBROJ KAJ LIBROJ DENOVE HAVEBLAJ

Aŭstralio. Delsudo kaj Laiho. Ilustrita ..	Broŝ. 5 ŝil.
Avo Joco Rigardas. Vazov (Georgiev) ..	Broŝ. 6 pecoj
Elektitaj Rakontoj. Jovkov (Iskrov) ..	Broŝ. 8 pecoj
Enkonduko en la Spiritisma Doktrino. Kardec	Broŝ. 1 ŝil.
La Esperanta Literaturo. M. de Waard ..	Broŝ. 2 ŝil. 6p.
La Granda Aventuro. F. Szilgáyi	Kart. 10 ŝil. 6p.
Hamleto. W. Shakespeare (L. L. Zamenhof) ..	Broŝ. 1 ŝil.
La Nekonata Konato. D. P. Boatman ..	Bind. 5 ŝil.
Okazas Nenio. Chr. Hougaard	Broŝ. 2 ŝil.
Palaco de Danĝero. Wagnalls (Payson) ..	Bind. 7 ŝil. 6p.
Pro Iŝtar. H. A. Luyken	Bind. 8 ŝil.
Rido Sanigas (Elektitaj humoraĵoj)	Broŝ. 8 pecoj
Sur Sanga Tero. Julio Baghy	Broŝ. 3 ŝil. 9p.
La Teatra Korbo. Julio Baghy	Broŝ. 1 ŝil. 6p.
Verdaj Donkiĥotoj. Julio Baghy	Broŝ. 2 ŝil.
La Verda Koro (Facila romaneto). Julio Baghy	Broŝ. 2 ŝil.

Aldonu 10% por la afranko.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

UNIVERSALA FILATELA ESPERANTO-KLUBO

U. F. E. K.
(fondita en 1944)

estas asocio, kiu grupigas ĉiujn filatelitojn-Esperantistojn en la tuta mondo.

Gia celo :

- (a) starigi filatelon sur seriozan bazon inter E.-filatelitoj,
- (b) plifaciligi poŝtmark-rilatojn inter E.-filatelitoj en la mondo, certigante honestan plenumon de poŝtmark-interŝanĝo,
- (c) instrui E.-filatelitojn pri filatelo per regula eldono de faka gazeto redaktita *nur* en pura Zamenhofa lingvo,
- (d) eldoni faklibrojn, (e) krei diversajn servojn,
- (f) krei asocian insignon.

Aperis jam kelkaj numeroj de tiu tre interesa kaj instrua gazeto LA POŝTMARKO ; ĝin povas ricevi nur klubanoj ; kunlaboru al ĝi.

Ne hezitu, skribu tuj al

UNIVERSALA FILATELA ESPERANTO-KLUBO
5 rue Sav. de Brazza, Casablanca, Maroko
Petu nian "Informantan varbfolion" kaj aliĝilon

ESPERANTO



OFICIALA ORGANO
DE INTERNACIA
ESPERANTO-LIGO

INTERNACIA

Eldonejo kaj Redakcio : Internacia Esperanto-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

VOL. 10, N-RO 5

MAJO 1946

GRUPESTROJ KURSGVIDANTOJ INSTRUISTOJ

Jen fine solvo de via problemo !

Jam ne necesas ke grupkunvenoj kaj kursoj
velku pro enuo

GAJA LEGANTO PER ESPERANTO

de P. E. SCHWERIN

Spritaĵoj — Vortludoj — Preseraroj — Anekdotoj
Matematikaĵoj — Rimaĵoj — Societludoj
Konsiloj por Grupestroj kaj Kursgvidantoj
Demandaro

Prezo : 1 ŝil. 3 pencoj, afranko 1 p.
(5 internaciaj respondekuponoj)



Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo